

SCIENCA REVUO de  
Internacia Scienca  
Asocio Esperantista  
BEOGRAD, Jugoslavio

El Vol. 26  
n-ro 4/5 (114/115)  
30.10.1975.

## APLIKO DE LA MEDIALA VOĈO

POR EKSPLIKI LA UZON DE LA PASIVAJ PARTICIPOJ

(A. Lienhardt, MULHOUSE, Francio)&/

### 1. ENKONDUKO

#### 1.1. KELKAJ DIFINOJ

1.1.1. Kiam iu aganto plenumas agon, oni povas diri: la ago (vole nevole) plenumiĝas. - "Plenumas" kaj "plenumiĝas" estas similaj tempoj de la verbo "plenumi".

Same, kiam iu aganto estas plenumanta agon, la ago estas plenumanta fare de la aganto: oni do povas diri: la ago (vole nevole) estas plenumanta. - "Estas plenumanta", "estas plenumata" kaj "estas plenumiĝanta" estas kompleksaj tempoj de la verbo "plenumi".

Laŭ P.G.E. (PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO), "plenumanta" estas AKTIVA PARTICIPO, "plenumata" estas PASIVA PARTICIPO, kaj "plenumiĝanta" estas MEDIALA PARTICIPO, Tiuj tri participoj karakterizas situacion *dum* la plenumiĝo de la ago; oni povas nomi ilin "dum-agaj participoj".

Simile, la tri participoj "plenuminta" (AKTIVA PARTICIPO), "plenumita" (PASIVA PARTICIPO), kaj "plenumiĝinta" (MEDIALA PARTICIPO) karakterizas situacion *post* la plenumiĝo de la ago; oni do povas nomi ilin "post-agaj participoj".

Ankaŭ simile, la tri participoj "plenumonta", "plenumota" kaj "plenumiĝonta" karakterizas situacion *antaŭ* la plenumiĝo de la ago; oni do povas nomi ilin "antaŭ-agaj participoj". (Referenco: "Ne kiel Meier", de Raymond Schwartz).

#### 1.2. PRI LA SUFIKSO -iĝ-

1.2.1. Laŭ P.V. (PLENA VORTARO DE ESPERANTO) kaj P.I.V. (PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO), la sufikso -iĝ/ esprimas, per si mem, ŝanĝon de stato; ĝi povas esprimi *agon pasive toleratan* (aŭ toleritan, aŭ tolerotan) de la subjekto de la propozicio (ekzemple: *spegulo rompiĝas*, aŭ *rompiĝis*, aŭ *rompiĝos*) aŭ *agon aktive faratan* (aŭ *faritan*, aŭ *farotan*) de la subjekto (ekzemple: *li sidiĝas*, aŭ *sidiĝis*, aŭ *sidiĝos*).

&/ 24 ave de Riedisheim, F-68100, MULHOUSE, Francio

RIMARKO. Pri la ĉi supra difino, necesas diri, ke la sufikso -iĝ/ esprimas unua-vice agon pasive toleratan (aŭ toleritan, tolerotan); por esprimi agon aktive faratan (faritan, farotan) kaj ankaŭ por precizigi la aŭtoron de la ago, estas preferinde uzi transitivan verboformon kun resenda pronomo (vidu P.V.p.186/1 RIM. l.). Ekzemploj: sin doni al, anstataŭ doniĝi al; sin edzigi al, anst. edziĝi al; sin sidigi sur, anst. sidiĝi sur; sin enlitigi por, (= sin meti en liton, por dormi) anst. enlitiĝi (= esti enlitigita fare de iu, pro malsano); sin malsanigi (per drogoj) anst. malsaniĝi (pro gripo) k.s.

1.2.2. La verbo "iĝi", uzata mem-stare, estas netransitiva verbo, kiu havas la saman sencan kiel la sufikso "-iĝ/"; ĝi apenaŭ diferencas de la verbo "fariĝi", kiun ĝi pli kaj pli anstataŭas. Ekzemplo: La ĉeval', por ĉiam, iĝis lia sklavo. (Vd. P.I.V. p.413/2, IV). En la franca lingvo, "iĝi" signifas "devenir, se faire", en la germana "werden, sich machen". Jen kelkaj kompareblaj ekzemploj, kun tradukoj:

- Tio iĝas bone. /Cela se fait bien. /Das macht sich gut.
- Tio iĝas bona. Tio fariĝas bona. /Cela devient bon. /Das wird gut.
- Li iĝas maljuna. /Il se fait vieux. Il vieillit. /Er wird alt.
- Tiu vino trinkiĝas bone. /Ce vin se boit bien. /Dieser Wein trinkt sich gut.

## 2. KOMPARO DE DIVERSAJ VERBO - VOĈOJ

### 2.1. PREZENCŬ - SIMPLAJ TEMPOJ

Kiam mi plenumas agon (AKTIVA VOĈO), tiam la ago plenumiĝas (MEDIALA VOĈO) pro mia ago. - La sam-tempeco, en la prezenco, de la du verboj "plenumas" kaj "plenumiĝas" estas evidenta (-as).

Ekzemplo 1. Kiam mi fermas pordon, tiam la pordo fermiĝas pro mi (= pro mia ago "fermi"). NOTO: "fermiĝas" estas verba derivaĵo de la transitiva radik-vorto "fermi", ne-transitivigita per la sufikso "-iĝ/".

Ekzemplo 2. Kiam mi blankiĝas plafonon, tiam la plafono blankiĝas pro mi (pro mia ago "blankigi"). NOTO: "blankiĝas" estas verba derivaĵo de la adjektivo "blanka", transitive verbigita per la sufikso "-iĝ/"; "blankiĝas" same estas verba derivaĵo de la adjektivo "blanka", ne-transitive verbigita per la sufikso "-iĝ/".

### 2.2. PREZENCŬ - KOMPLEKSĬAJ TEMPOJ

2.2.1. Dum la momento, kiam mi estas plenumanta agon (AKTIVA VOĈO), tiam la ago estas plenumiĝanta (MEDIALA VOĈO) fare de mi. Estas evidente, ke "ago plenumiĝanta" korespondas al "ago plenumata".

2.2.1.1. DIFINO: La tri dum-tempe korespondajn participojn "plenumanta" (AKTIVA), "plenumiĝanta" (MEDIALA) kaj "plenumata" (PASIVA) ni nomas "dum-agaj participojn". (Vidu sub 1.1.1.).

Ekzemplo 3. Mi estas fermenta la pordon; tial la pordo estas fermiĝanta, ĉar ĝi estas fermata fare de mi.

Ekzemplo 4. Mi estas blankiganta la plafonon; tial la plafono estas blankiĝanta, ĉar ĝi estas blankigata fare de mi.

2.2.2. Post la momento, kiam mi estas plenuminta agon (AKTIVA VOĈO), tiam la ago estas plenumiĝinta (MEDIALA VOĈO), ĉar ĝi estas plenumita (PASIVA VOĈO) fare de mi.

2.2.2.1. DIFINO: La tri *post*-tempe korespondajn participojn "plenuminta" (AKTIVA), "plenumiĝinta" (MEDIALA) kaj "plenumita" (PASIVA) ni nomas "*post*-agaj participoj". (Vidu sub 1.1.1.)

Ekzemplo 5. Mi estas *ferminta* la pordon; tial la pordo estas *fermiĝinta*, ĉar ĝi estas *fermita* fare de mi.

RIMARKO. Estas oportune atentigi ĉi tie pri la fakto, ke la *post*-aga participo "fermita" havas duoblan karakteron gramatikan, nome *verban* (pri-agan) kaj *adjektan* (pri-statan), kio estas klare videbla en la du jenaj propozicioj kaj en ties tradukoj en la franca kaj germana lingvoj:

a/ La pordo *estas fermita fare de mi*. - Tiu propozicio esprimas agon, mian agon "fermi la pordon".

F: La porte *a été fermée par moi*.

G: Die Türe *ist von mir zu gemacht worden*.

b/ La pordo *estas fermita (= ne aperta)*. - Tiu propozicio esprimas staton: la fermitecon de la pordo.

F: La porte *est fermée (= non ouverte)*.

G: Die Türe *ist zu (= nicht offen)*.

Oni do povas diri ke *post*-aga pasiva participo estas vort-hibrido; ĝia karaktero adjectiva certa-grade stompas ties karakteron *verban*, kaj *inverse*. Estas konjekteble ke tiu fakto foje kaŭzis bedaŭrindajn miskomprenojn en la debatoj pri la tiel nomata participoproblemo.

Ekzemplo 6. Mi estas *blankiĝinta* la plafonon; tial la plafono estas *blankiĝinta*, ĉar ĝi estas *blankigita* fare de mi.

2.2.3. Antaŭ la momento, kiam mi estas *plenumonta* agon (AKTIVA VOĈO), tiam la ago estas *plenumiĝonta* (MEDIALA VOĈO), ĉar ĝi estas *plenumota* (PASIVA VOĈO) fare de mi.

2.2.3.1. DIFINO: La tri *antaŭ*-tempe korespondajn participojn "plenumonta" (AKTIVA), "plenumiĝonta" (MEDIALA) kaj "plenumota" (PASIVA) ni nomas "*antaŭ*-agaj participoj". (Vidu sub 1.1.1.)

Ekzemplo 7. Mi estas *fermanta* la pordon; tial la pordo estas *fermiĝonta*, ĉar ĝi estas *fermata* fare de mi.

Ekzemplo 8. Mi estas *blankiganta* la plafonon; tial la plafono estas *blankiĝonta*, ĉar ĝi estas *blankigota* fare de mi.

## 2.3. PASEO - SIMPLAJ TEMPOJ

Kiam mi *plenumis* agon (AKTIVA VOĈO), tiam la ago *plenumiĝis* (MEDIALA VOĈO) pro mi. - La samtempeco, en la paseo, de la du verboj "plenumis" kaj "plenumiĝis" estas evidenta (-is).

Ekzemplo 9. Kiam mi *fermis* la fenestron, tiam la fenestro *fermiĝis* pro mi (pro mia ago "fermi").

Ekzemplo 10. Kiam mi *blankigis* la muron, tiam la muro *blankiĝis* pro mi (pro mia ago "blankigi").

## 2.4. PASEO - KOMPLEKSAJ TEMPOJ

2.4.1. Dum la momento, kiam mi *estis plenumanta* agon (AKTIVA VOĈO), tiam la ago *estis plenumiĝanta* (MEDIALA VOĈO), ĉar ĝi *estis plenumata* (PASIVA VOĈO) fare de mi.

2.4.1.1. DIFINO: Vidu 2.2.2.1.

Ekzemplo 11. Mi estis fermanta la fenestron; tial la fenestro estis fermiganta, ĉar ĝi estis fermata fare de mi.

Ekzemplo 12. Mi estis blankiganta la muron; tial la muro estis blankiganta, ĉar ĝi estis blankigata fare de mi.

2.4.2. Post la momento, kiam mi estis plenuminta agon (AKTIVA VOĈO), tiam la ago estis plenumiginta (MEDIALA VOĈO), ĉar ĝi estis plenumita fare de mi (PASIVA VOĈO).

2.4.2.1. DIFINO: Vidu 2.2.1.2.

Ekzemplo 13. Mi estis ferminta la fenestron; tial la fenestro estis fermiginta, ĉar ĝi estis fermita fare de mi.

Ekzemplo 14. Mi estis blankiginta la muron; tial la muro estis blankiginta, ĉar ĝi estis blankigita fare de mi.

2.4.3. Antaŭ la momento, kiam mi estis plenumonta agon (AKTIVA VOĈO), tiam la ago estis plenumigonta (MEDIALA VOĈO), ĉar ĝi estis plenumota (PASIVA VOĈO) fare de mi.

2.4.3.1. DIFINO: Vidu 2.2.3.1.

Ekzemplo 15. Mi estis fermonta la fenestron; tial la fenestro estis fermigonta, ĉar ĝi estis fermota fare de mi.

Ekzemplo 16. Mi estis blankigonta la muron; tial la muro estis blankigonta, ĉar ĝi estis blankigota fare de mi.

## P.5. FUTURO - SIMPLAJ TEMPOJ

Kiam mi plenumos agon (AKTIVA VOĈO), tiam la ago plenumigos (MEDIALA VOĈO) pro mi. - La sam-tempeco, en la futuro, de la du verboj "plenumos" kaj "plenumigos" estas evidenta (-os).

Ekzemplo 17. Kiam mi fermos la valizon, tiam la valizo fermigos pro mi (pro mia ago "fermi").

Ekzemplo 18. Kiam mi blankigos la vitron, tiam la vitro blankigos pro mi (pro mia ago "blankigi").

## 2.6. FUTURO - KOMPLEKSAJ TEMPOJ

2.6.1. Dum la momento, kiam mi estos plenumanta agon (AKTIVA VOĈO), tiam la ago estos plenumiganta (MEDIALA VOĈO), ĉar ĝi estos plenumata (PASIVA VOĈO) fare de mi.

2.6.1.1. DIFINO: Vidu 2.2.2.1.

Ekzemplo 19. Mi estos fermanta la valizon; tial la valizo estos fermiganta, ĉar ĝi estos fermata de mi.

Ekzemplo 20. Mi estos blankiganta la vitron; tial la vitro estos blankiganta, ĉar ĝi estos blankigata fare de mi.

2.6.2. Post la momento, kiam mi estos plenuminta agon (AKTIVA VOĈO), tiam la ago estos plenumiginta (MEDIALA VOĈO), ĉar ĝi estos plenumita (PASIVA VOĈO) fare de mi.

2.6.2.1. DIFINO: Vidu 2.2.2.1.

Ekzemplo 21. Mi estos ferminta la valizon; tial la valizo estos fermiginta, ĉar ĝi estos fermata fare de mi.

Ekzemplo 22. Mi estos blankiginta la vitron; tial la vitro estos blankiginta, ĉar ĝi estos blankigata fare de mi.

2.6.3. Antaŭ la momento, kiam mi estos plenumonta agon (AKTIVA VOĈO), tiam la ago estos plenumigonta (MEDIALA VOĈO), ĉar ĝi estos plenumota (PASIVA VOĈO) fare de mi.

2.6.3.1. DIFINO: Vidu 2.2.3.1.

Ekzemplo 23. Mi estos blankigonta la vitron; tial la vitro estas blankigonta, ĉar ĝi estos blankigota fare de mi.

Ekzemplo 24. Mi estos fermenta la valizon; tial la valizo estos fermigonta, ĉar ĝi estos fermota fare de mi.

### 3. KONKLUDOJ EL TIREBLAJ EL 2.

La ĉi supra komparo de la kompleksaj tempoj ebligas eltiri la konkludojn ke:

3.1. ekzistas evidenta laŭ-fundamenta sam'tempeco inter:

3.1.1. la tri DUM-agaj participoj "plenumanta", "plenumiganta" kaj "plenumata fare de",

3.1.2. la tri POST-agaj participoj "plenuminta", "plenumiginta", "plenumita fare de",

3.1.3. la tri ANTAŬ-agaj participoj "plenumonta", "plenumigonta" kaj "plenumota fare de".

3.2. ekzistas rekta interdependeco inter la iu-grade samsencaj medialaj kaj pasivaj participoj:

3.2.1. "plenumiganta" kaj "plenumata"

3.2.2. "plenumiginta" kaj "plenumita"

3.2.3. "plenumigonta" kaj "plenumota"

3.3. Tiuj konstatoj ebligas formuli la tri jenajn praktikajn regulojn pri la uzo de la pasivaj participoj

3.3.1. Kiam oni parolas pri ago, kiu estas konsiderebla kiel "ago plenumiganta" (tio estas "ago plenumata fare de iu aganto"), tiam la koncerna pasiva participo devas ricevi la finaĵon "-ata".

3.3.2. Kiam oni parolas pri ago, kiu estas konsiderebla kiel "ago plenumiginta" (t.e. "ago plenumita fare de iu aganto"), tiam la koncerna pasiva participo devas ricevi la finaĵon "-ita".

3.3.3. Kiam oni parolas pri ago, kiu estas konsiderebla kiel "ago plenumigonta" (t.e. "ago plenumota fare de iu aganto"), tiam la koncerna pasiva participo devas ricevi la finaĵon "-ota".

### 4. ESPLORO PRI LA KVAR "TIPAJ FRAZOJ"

Temas pri la kvar "tipaj frazoj" formulitaj fare de la Akademio de Esperanto kaj publikigitaj en "Revuo Esperanto" (U.E.A.), 746, januaro 1968, paĝo 2.

Por pritrakti la aferon laŭ-eble objektive, ni ekzamenu sinseksive du versiojn de ĉiu frazo, metante la koncernen pasivan partupon unue en la prezoncon kaj poste en la paseon.

4.1.1. "Ni garantias ke la domoj (...) estos rekonstruataj (fare de nia konstruad-entrepreno) EN 1970." - Tiu propozicio esprimas agon (la konstruad-agon, la dom-konstruadon) per la IUM-aga participo "rekonstrataj"; ĝi implicas la jenajn ideojn:

a/ La garantiintoj estos rekonstruataj (AKTIVA PARTICIPO DUM-AGA) la domojn en 1970, pli malpli daŭre, eble dum la tuta jaro, sed ne certe. Ili rekonstruos la domojn en 1970, almenaŭ parte.

b/ La domoj estos rekonstruigantaj (MEDIALA PARTICIPO DUM-AGA) en 1970, dum nedifinita tempo-daŭro.

c/ La rekonstruado (...) estos iĝanta (efektiviĝanta/okazanta / plenumiĝanta) certa-grade en 1970, dum nedifinita tempo-daŭro.

d/ La rekonstruado (...) estos farata (efektivigata, certa-grade plenumata - PASIVA PARTICIPO DUM-AGA) fare de la entrepreno, en 1970.

e/ La domoj troviĝos "en rekonstruado" ("en rekonstruiĝo") dum certa tempo-daŭro, en 1970.

4.1.2. "Ni garantias, ke la domoj (...) estos rekonstruitaj (fare de nia entrepreno) en 1970." - Tiu propozicio esprimas *staton*, t.e. la rezulton de la konstruado, la konstruitecon de la domoj, per la POST-AGA PARTICIPO "rekonstruitaj"; ĝi implicas la jenajn ideojn:

a/ La garantiintoj estos rekonstruataj (AKTIVA PARTICIPO POST-AGA) la domojn en 1970. Ili rekonstruos la domojn tute kaj ĝis-fine, antaŭ la fino de 1970.

b/ La domoj estos rekonstruigintaj (MEDIALA PARTICIPO POST-AGA) en 1970, antaŭ la fino de la jaro.

c/ La rekonstruado estos iĝinta (efektiviĝinta/ plenumiĝinta/ finiĝinta) en 1970, antaŭ la jar-fino.

d/ La rekonstruado (...) estos farata (efektivigita / plenumita / finita) fare de la entrepreno en la jaro 1970, antaŭ la jarfino.

e/ La domoj ne plu troviĝos "en konstruado" ("en konstruiĝo") post la fino de la jaro 1970.

4.1.3. Komente pri 4.1.1. kaj 4.1.2.: Se la domposedantoj deziras, ke la entrepreno komencu la rekonstruadon plej malfrue en 1970, ili povas konsenti kun la garanti-formulo 4.1.1. Sed se ili postulas, ke la entrepreno certe finu la rekonstruadon antaŭ la fino de la jaro 1970, ili elektos la formulon 4.1.2.

4.1.4. Por-kompara frazo-ekzemplo, kun ambaŭ participoj: "Ni garantias ke la domoj (...) estos rekonstruataj (fare de nia entrepreno) dum la dek unuaj monatoj en 1970; la domoj estos certe kaj ĝisfine rekonstruitaj plej malfrue je la 1-a de novembro 1970."

4.2.1. "Mi promesas ke mia ŝuldo estos pagata (fare de mi aŭ alia persono) la 9-an de Majo."

Necesas diri antaŭe ke la akuzativa formo "la 9an de Majo" ne estas sufiĉe preciza, ĉar ĝi enhavas du malsamajn sencojn, nome: "je la 9-a de Majo", t.e. la momento kiam aperas sur la kalendaroj la dato de la 9-a de Majo. (A: on the ninth of May; F: le 9 mai; G: am 9.Mai). Ĉi tie, la prepozicio "je" estas uzata en la senco 3 difinita en P.I.V. p.451: "je la tria matene", t.e. la tempo-punkto kiam finiĝas la dua horo kaj komenciĝas la tria.

"en la 9-a de Majo", t.e. je iu "momento" (aŭ dum iu tempo-daŭro) en la tago, kies dato estas la 9-a de majo. (A: in the course of the ninth of May; F: au courant du 9 mai; G: Im Verlauf des 9. Mai).

La propozicio 4.2.1. esprimas *agon* (la pag-agon; la pagadon de la sumo ŝuldata) per la DUM-aga participo "pagata"; ĝi implicas la jenajn ideojn:

a/ La ŝuldanto estos paganta (AKTIVA PARTICIPO DUM-AGA) sian ŝuldon en la tago de la 9-a de Majo. Li pagos ĝin je iu "momento" en la koncerna tago.

b/ La ŝuldo estos pagiĝanta (MEDIALA PARTICIPO DUM-AGA) en la tago de la 9-a de Majo.

c/ La pagado estos *iĝanta* (efektiviĝanta / okazanta / plenumiĝanta) je iu momento en la koncerna tago.

d/ La pagado de la ŝuldo estos *farata* (efektivigata / plenumata - PASIVAJ PARTICIPOJ DUM-AGAJ) fare de mi aŭ alia persono, je iu momento en la koncerna tago.

e/ La pagado (pagiĝo) de la ŝuldo okazos en la koncerna tago, nek antaŭe, nek poste.

4.2.2. "Mi promesas, ke mia ŝuldo estos *pagita* (fare de mi aŭ alia persono) la 9-an de Majo". (Pri la akuzativa formo "la 9-an de Majo" vidu ĉi supre). Tiu propozicio esprimas rezulton de ago (t.e. la rezulto de la pag-ago, de la pagado) per la POST-aga participo "*pagita*"; ĝi implicas la jenajn ideojn, rezultantajn el la duobla senco de la akuzativa formo "la 9-an de Majo":

a.1/ La ŝuldanto estos jam *paginta* (AKTIVA PARTICIPO POST-AGA) je la 9-a de Majo (do: jam antaŭ la koncerna tago);

a.2/ La ŝuldanto estos *paginta* nur en la tago de la 9-a de Majo (do: je iu momento, aŭ dum iu tempo-daŭro, en la koncerna tago).

b/ La ŝuldo estos *pagiĝinta* (MEDIALA PARTICIPO POST-AGA) aŭ je la 9-a de Majo (kaj eble jam antaŭe), aŭ en la koncerna tago.

c/ La senŝuldiĝo (t.e. la pago de la ŝuldo) estos *iĝinta* (efektiviĝinta / okazinta / plenumiĝinta) aŭ je la 9-a de Majo (kaj eble jam antaŭe) aŭ en la koncerna tago.

d/ La pag'ago (aŭ: pagado) de la ŝuldo estos *farata* (efektivigata / plenumita - PASIVAJ PARTICIPOJ POST-AGAJ) fare de mi aŭ alia persono plej malfrue je iu "momento" en la koncerna tago, antaŭ la tag'fino.

e/ La senŝuldiĝo de la ŝuldanto okazos aŭ antaŭ la tago de la 9-a de Majo, aŭ (plej malfrue) en tiu tago.

4.2.3. Komento pri 4.2.1. kaj 4.2.2.: Anstataŭ uzi la nesufiĉe precizan akuzativan formon "la 9-an de Majo", estas preferinde uzi propozicion: en 4.2.1. "La ŝuldo estos *pagata* en la 9-a de Majo";

en 4.2.2. "La ŝuldo estos *pagita* je la 9-a de Majo". La formulo 4.2.2. (kun aŭ sen akuzativo) estas preferinda por la pruntedoninto, ĉar ĝi enhavas eblecon pri repago pli frua, do jam antaŭ la koncerna tago.

4.2.4. Por-kompara frazo-ekzemplo, kun ambaŭ participoj: "Mi promesas, ke mia ŝuldo estos *pagata* (fare de mi, pagiĝanta) en la tago de 8-a aŭ 9-a de Majo. Vi do certe estos ricevinta vian monon antaŭ aŭ en la tago kies dato estas la 9-a de Majo, ĉar tiam, plej malfrue je la 18-a horo, mia ŝuldo estos *pagita* (pagiĝinta).

4.3.1. "Ni asertas, ke la aŭtomobilo de s-ro X... estis *riparata* (fare de nia specialisto) la lastan semajnon". (Pri la evitenda formo akuzativa "la lastan semajnon", vidu 4.2.1.). - Tiu propozicio esprimas agon (la ripar'ago, la riparado de la aŭtomobilo) per la DUM-aga participo "*riparata*"; ĝi implicas la jenajn ideojn:

a/ La specialisto estis *riparanta* (AKTIVA PARTICIPO DUM-AGA) la aŭtomobilon, tute aŭ nur parte, ade aŭ ne-ade, en la ĵus-lastan semajno, do inter du sinsekvaj dimanĉoj, dum nedefinita daŭro.

b/ La aŭtomobilo estis *ripariĝanta* (MEDIALA PARTICIPO DUM-AGA), almenaŭ parte se ne tute, iam en la ĵus-lastan semajno.

c/ La ripar-ago (riparado) estis *iĝanta* (efektiviĝanta / okazanta-grade aŭ eble eĉ ĝisfine, dum kelka tempo (t.e. dum kelkaj horoj aŭ tagoj) en la ĵus-lastan semajno.

d/ La ripar-ago (riparado) estis farata (efektivigata / certa-grade plenumata - PASIVAJ PARTICIPOJ DUM-AGAJ) fare de la specialisto en iuj horoj aŭ tagoj de la koncerna semajno.

e/ La aŭtomobilo troviĝis "en riparado" ("en ripariĝo") dum certa nombro da horoj aŭ tagoj en la ĵus pasinta semajno.

4.3.2. "Ni asertas, ke la aŭtomobilo de s-ro X... estis riparita (fare de nia specialisto) la lastan semajnon". (Pri la evitenda formo akuzativa "la lastan semajnon" vidu 4.2.1.). - Tiu propozicio esprimas *ŝtaton* (kiu estas la rezulto de la ripar-ago, de la riparado, t. e. la ripariteco de la aŭtomobilo) per la POST-aga participo "riparita"; ĝi implicas la jenajn ideojn:

a/ La specialisto estis riparinta (AKTIVA PARTICIPO POST-AGA) la aŭtomobilon ĝisfine, plej malfrue je la tempo-punkto de la fino de la ĵus-lastaj semajno.

b/ La aŭtomobilo estis ripariginta (MEDIALA PARTICIPO POST-AGA) tute kaj ĝis-fine, je iu "momento" en la koncerna semajno.

c/ La ripar-ago (riparado) estis komplete iginta (efektiviĝinta / plenumiĝinta / finiĝinta) je iu momento en la koncerna semajno.

d/ La ripar-ago (riparado) estis farita (efektivigata / plenumita / finita - PASIVAJ PARTICIPOJ POST-AGAJ) fare de la specialisto, komplete kaj ĝis-fine, je iu momento en la koncerna semajno.

e/ La aŭtomobilo ne plu troviĝis "en riparado" ("en ripariĝo") je la tempo-punkto de la fino de la ĵus pasinta semajno.

4.3.3. Komento pri 4.3.1. kaj 4.3.2.: Per la teksto 4.3.1. oni asertas ke la aŭtomobilo troviĝis "en riparado" dum parto de la ĵus-lastaj semajno aŭ eble dum la tuta semajno. Tio ne signifas ke oni finis la riparon.

Male, per la teksto 4.3.2. oni asertas ke oni efektive finis la riparon, t. e. ke la riparado efektive finiĝis je iu momento en iu tago de la koncerna semajno. Tre probable, estas tio kion deziris la kliento.

4.3.4. Por-kompara frazo-ekzemplo, kun ambaŭ participoj: "Kiam, marde kaj merkrede en la ĵus-lastaj semajno, via aŭtomobilo estis riparita (estis ripariĝanta, estis "en riparado") fare de nia specialisto, li trovis difekton en la motoro; post kiam ĝi estis ĝis-fine riparita (estis ĝisfine ripariĝinta) fare de li, via veturilo estis veturpreta jaŭdon vespere."

4.4.1. "Via propono estis akceptata (fare de la komitato) la 3-an de Junio." (Pri la evitenda formo akuzativa "la 3-an de Junio" vidu 4.2.1.). - Tiu propozicio esprimas *agon* (la akcept'agon, la akceptadon de la propono) per la DUM-aga participo "akceptata"; ĝi implicas la jenajn ideojn:

a/ Oni (t. e. la komitato) estis akceptanta (AKTIVA PARTICIPO DUM-AGA) vian proponon je iu momento en la tago de la 3-a de Junio. Oni akceptis ĝin je iu momento en la koncerna tago.

b/ Via propono estis akceptiganta (MEDIALA PARTICIPO DUM-AGA) je iu momento en la koncerna tago.

c/ La akcept'ago de via propono estis iganta (efektiviĝanta / okazanta / plenumiĝanta) je iu momento en la koncerna tago.

d/ La akceptado de via propono estis farata (efektivigata / plenumata - PASIVAJ PARTICIPOJ DUM-AGAJ) fare de la komitato en la koncerna tago.

e/ La akceptado (...) okazis en la koncerna tago (inter la 10-a kaj 11-a horo, ekzemple).



4.4.2. "Via propono estis akceptita (fare de la komitato) la 3-an de Junio." (Pri la evitenda formo akuzativa "la 3-an de Junio" vidu 4.2.1.). - Tiu propozicio esprimas *rezulton de ago* (t.e. la rezulto de la akcept-ago, de la akceptado; do la akceptiteco de la propono), per la **POST**-aga participo "akceptita"; ĝi implicas la jenajn ideojn:

a/ Ĉni (t.e. la komitato) estis akceptinta (AKTIVA PARTICIPIO **POST**-AGA) vian proponon:

- aŭ *je* la 3-a de Junio (t.e. jam antaŭ tiu dato, aŭ plej malfrue en la koncerna tago),

- aŭ *en* la tago de la 3-a de Junio (t.e. *je* iu momento *en* la koncerna tago).

b/ Via propono estis akceptiginta (MEDIALA PARTICIPIO **POST**-AGA) aŭ *je* la dato de la 3-a de Junio, aŭ *en* la koncerna tago.

c/ La akcept-ago de via propono estis iginta (efektiviiginta / plenumiginta / okazinta) aŭ *je* aŭ *en* la koncerna tago.

d/ La akceptado de via propono estis farita (efektivigita / plenumita) aŭ antaŭ la 3-a de Junio, aŭ (plej malfrue) *en* la tago de la koncerna dato.

e/ la akcepto (...) okazis aŭ antaŭ la tago de la 3-a de Junio aŭ (plej malfrue) *en* tiu tago.

4.4.3. Komento pri 4.4.1. kaj 4.4.2.: Kiam oni volas akcenti la daton *de la tago* (kaj, eventuale, la horon), en kiu oni akceptis la proponon, estas konsilinde uzi la partupon "akceptata", kiu reliefigas la agon de la akcepto; sed kiam oni volas akcenti la fakton de la akceptiteco, estas preferinde uzi la partupon "akceptita".

4.4.4. Por-kompara frazo-ekzemplo, kun ambaŭ participoj: "La kongresantoj estos oficiale akceptataj (akceptigantaj) je la 12-a horo, fare de la urbestro. Tuj poste, kiam ili estos akceptitaj (akceptigitaj) fare de diversaj alt-rangaj personoj, ili estos regalataj (regaligitaj) per kuko kaj vino, fare de la vic-urbestro kaj ties edzino."

## 5. ALIAJ FRAZO-EKZEMPLOJ

### KUN DUM-AGAJ KAJ POST-AGAJ PARTICIPIOJ

5.1. Dum, en unu ĉambro, la gastoj dancadis, en la dua ĉambro estis preparata (PLENUMIGANTA AGO) la vespermanĝo; kiam la tablo estis preparita (PLENUMIGANTA AGO), oni invitis la gastojn al la tablo. (El "Unua Ekzercaro", de d-ro L.L.ZAMENHOF).

5.2. En fremda lando oni ne povas ĉiutage trovi ŝelon de fromaĝo kaj lardo-haŭton; ne, tie oni riskas suferi malsaton, oni eĉ povas vivante esti formangata (IGANTA AGO) de kato! ... ,,. Kaj ankoraŭ pli rapide ĝi kuris antaŭen, tage kaj nokte. La panoj estis formangitaj (IGANTA AGO), la ŝinko ankaŭ, kaj jen, ili estis en Laplando! (El "Fabeloj de Andersen", III/76 kaj II/70).

5.3. "Vi ne povas tuj iri en la ĉambron, ĉar nun-momente la planko estas lavata fare de Anetta (IGANTA AGO). Post kelkaj minutoj, kiam ĝi estos lavita fare de ŝi (IGANTA AGO), vi povos senĝene eniri."

5.4. Morgaŭ matene, inter la 11-a kaj la 12-a horo, la ekspozicio estos solene inaŭgurata fare de la ĉef-ministro (IGANTA AGO).

Precize je la 12-a horo, kiam la ceremonio estos finita (finiĝinta-IGINTA AGO), la pordejoj de la ekspozicio estos malfermataj (malfermiĝantaj - IGANTA AGO) por la vizitantoj.

5.5. Hieraŭ, dum du horoj, inter la 20-a kaj la 23-a horo, la nova komitato estis elektata (elektiĝanta) fare de la membroj (IGANTA AGO). Fine, kiam ĉiuj komitatanoj estis elektitaj (elektiĝintaj - IGINTA AGO), ni povis prepari la novan agad-programon de nia asocio.

5.6. Venontan mardon (aŭ pli bone: En la venonta mardo), inter 9h 21m kaj 9h 22m, estos pafata fare de la internacia teamo (IGANTA AGO) la 500-tuna spaco-raketo; du horojn post kiam ĝi estos pafita (IGINTA AGO), komenciĝos la televidaj emisioj en la tuta mondo.

5.7. S-ro Bliss, viktimo de akcidento, estis trovata fare de pasantoj (IGANTA AGO) hieraŭ vespere sur la ŝoseo; unu horon post kiam li estis trovita-IGINTA AGO), li estis transportata (IGANTA AGO) en la hospitalon.

5.8. En la momento, kiam la filo de la ŝtat-prezidento estis naskata (IGANTA AGO: Kiam la edzino de la prezidento estis naskanta la infanon), la tuta popolo estis amasiĝinta antaŭ la prezidenta palarco. Tuj post kiam la knabo estis naskita (naskiĝinta - IGINTA AGO: Kiam la patrino estis naskinta la infanon), cent kanono-pafoj estis pafataj (IGANTA AGO: Oni pafis cent kanono-pafojn unu post la alia) en regulaj intervaloj, ĝis la nokto-mezo.

5.9. "La regno de Dio estos prenita for de vi (IGINTA AGO) kaj estos donita al nacio (IGINTA AGO), kiu liveros ĝiajn fruktojn," - (Londona Biblio-eldono, 1926, laŭ d-ro L.L.ZAMENHOF; Evangelio de Sankta Mateo, verso 21'43.)

5.10. "Nun, mi sciigos al vi, kion mi faros el mia vinberĝardeno: for-igita estos (IGINTA AGO) ĝia barilo, kaj ĝi estos ruinigata (IGANTA AGO); ĝiaj muroj estos dis-ĵetitaj (IGINTA AGO) per unu frapo, kaj ĝi estos pied-premata (IGANTA AGO), kiam homo aŭ besto pasos sur ĝi". (Sama fonto; el Jesaja, verso 5'5).

## 6. ĜENERALAJ FORMULOJ PRI LA PARTICIPOJ

### 6.1. DUM-AGAJ PARTICIPOJ

6.1.1. Kiam iu persono estas (estis / estos) plenumanta agon (AKTIVA VOĈO) :

- je iu tempo-punkto (t.e. je certa "momento", horo, tago, dato, okazo),
- dum iu ajn tempo-daŭro (t.e. dum ono de sekundo, aŭ dum sekundo, sekundoj, horoj, tagoj, monatoj, jaroj, ...),

tiam la koncerna ago estas (estis / estos) plenumiĝanta (MEDIALA VOĈO) dum koresponda tempo-daŭro, ĉar ĝi estas (estis / estos) plenumata (PASIVA VOĈO) fare de la koncerna persono (kaj tolerata de ties "viktimo") dum la koresponda tempo-daŭro.

6.1.2. Kiam la kaŭzo estas (estis / estos) *estiganta* natur-fenomenon (AKTIVA VOĈO) :

- je iu tempo-punkto (vidu 6.1.1.),
- dum iu ajn tempo-daŭro (vidu 6.1.1.),

tiam la koncerna fenomeno estas (estis / estos) *estiganta* (MEDIALA VOĈO) dum koresponda tempo-daŭro, ĉar ĝi estas (estis / estos) *estigata* (PASIVA VOĈO) fare de la kaŭzo (kaj *tolerata* de ties "viktimo") dum la koresponda tempo-daŭro.

## 6.2. POST-AGAJ PARTICIPOJ

6.2.1. Kiam la persono estas (estis / estos) *plenuminta* agon (AKTIVA VOĈO) :

- je iu tempo-punkto (vidu 6.1.1.)
- dum iu ajn tempo-daŭro (vidu 6.1.1.),

tiam la koncerna ago estas (estis / estos) *plenumiginta* (MEDIALA VOĈO) dum koresponda tempo-daŭro, ĉar ĝi estas (estis / estos) *plenumita* (PASIVA VOĈO) fare de la koncerna persono (kaj *tolerita* de ties "viktimo") dum la koncerna tempo-daŭro.

6.2.2. Kiam la kaŭzo estas (estis / estos) *estiginta* natur-fenomenon (AKTIVA VOĈO) :

- je iu tempo-punkto (vidu 6.1.1.),
- dum iu ajn tempo-daŭro (vidu 6.1.1.),

tiam la koncerna fenomeno estas (estis / estos) *estiginta* (MEDIALA VOĈO) dum koresponda tempo-daŭro, ĉar ĝi estas (estis / estos) *estigita* (PASIVA VOĈO) fare de la kaŭzo (kaj *tolerita* de ties "viktimo") dum la koresponda tempo-daŭro.

## 6.3. ANTAŬ-AGAJ PARTICIPOJ

6.3.1. Kiam iu persono estas (estis / estos) *plenumonta* agon, je iu tempo-punkto kaj dum iu ajn tempo-daŭro, tiam la ago estas (... / ...) *plenumigonta* dum koresponda tempo-daŭro, ĉar ĝi estas (... / ...) *plenumota* fare de la koncerna persono dum la koresponda tempo-daŭro.

6.3.2. Kiam iu kaŭzo estas (... / ...) *estigonta* natur-fenomenon, je iu tempo-punkto kaj dum iu ajn tempo-daŭro, tiam ĝi estas (... / ...) *estigonta* dum koresponda tempo-daŭro, ĉar ĝi estas (... / ...) *estigota* fare de la kaŭzo dum la koresponda tempo-daŭro.

## 7. POST-PAROLO

La aŭtoro de ĉi tiu traktaĵo celis montri:

unue, ke ekzistas admirinda pri-tempa ekvilibro en la verbo-strukturo de Esperanto, precipe en tiu de la aktivaj, la medialaj kaj la pasivaj participoj;

due, ke metoda apliko de medialaj verbo-voĉoj ebligas, laŭ pure gramatika vid-punkto, faciligi al Esperanto-lernantoj la uzon de la dum-agaj kaj post-agaj participoj.

Tamen, estas dirende ke, en la praktika uzado de vivanta lingvo,

foje aperas psikologiaj motivoj kiuj estas pli imperativaj ol gramatikaj reguloj. Efektive, en la homa agado, la ago mem, la plenumiĝo de ago (en aliaj vortoj: "la plenumiĝanta ago", "la ago plenumata fare de aganto") ofte gravas malpli ol la rezulto de la ago (en aliaj vortoj: "la plenumiĝinta ago", "la ago plenumita fare de aganto"). Tio, pli-malpli subkonscie, povas instigi iujn praktikantojn de la Internacia Lingvo foje preferi post-agan partupon (finaĵo "-ita") ol la dum-agan (finaĵo "-ata"). Oni sentas tion tre bone en la kvar test-frazoj 4.1.2. (domoj rekonstruitaj), 4.2.2. (ŝuldo pagita), 4.3.2. (aŭtomobilo riparita) kaj 4.4.2. (propono akceptita). Sed, laŭ vidpunkto pure lingvistika, la pasivaj partupoj "dum-aga" kaj "post-aga" posedas siajn proprajn ecojn klare difineblajn kaj distingeblajn, strikte ligitajn al la logika verbo-strukturo de Esperanto. Estas tiuj ecoj, kaj nur ili, kiuj decidas pri la ĝusta uzado de tiuj partupoj, kiam oni volas karakterizi la "iĝantecon" aŭ la "iĝintecon" de ago, sendepende de ties daŭro en la paseo, la prezenco aŭ la futuro.

Per fini, estu dirite, ke la ĉi tie prezentitaj argumentoj ne nur havu la ĉi-supre formulitan celon, sed ankaŭ alportu eblecon akordigi malsamajn opiniojn sur la tereno de la tiel nomita "partupico-problemo". Kiar, en tiu optiko, oni analizas la multajn zamenhofajn (kaj aliajn) partupico-ekzemplojn, kiujn aro da "pacaj batalantoj" diligente kolektis, oni akiras la impreson ke tia ebleco ekzistas. Ke ĝi povu realiĝi, ho-grade, tion sincere deziras la aŭtoro.